


Auxtuno 2002

(4)

Okt. - Nov. - Dec.

La Voĉo de Amikejo

informilo pri *Senlime* kaj
Esperanto en Euxregiono Mozo-Rejno



En cas de non distribution, renvoyer à:

S-ro Heinrich **Lentzen**,
Feldweg 20
B 4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-554326
Mail: lentzenh@gmx.net



Enhavo :

- [2. Verda virkapr\(eg\)o en Franchimont \(1\)](#)
- [3. Verda virkapr\(eg\)o en Franchimont \(2\)](#)
- [4. La lasta markgrafo Franchimont-a \(dauxrigo\)](#)
- [5. WDR-Akeno televide elsendis pri esperanto el Kelmis](#)
- [6. Trilanda renkontigxo apud Vervierso](#)

Eldonita de Verviersa Esperanto-Grupo kaj *Senlime*, kunlabore kun la Ministerio pri franclingva Komunumo en Belgio.

Tiu-cxi informilo senpage konsulteblas kaj kopieblas el niaj ret-pagxoj je la URL:

<http://www.ping.be/jmjsenlime>

H. Lentzen prizorgas surpaperigon kaj sendadon nur al la kotizintaj membroj. La belgaj valonoj, membroj de APE, ricevas la informilon ene de "Inter Ni".

Editeur responsable / Responsa eldonanto (franclingva):

GSM +32-486-947.957

Mail: jmjsenlime@planetinternet.be

J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
B-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands / Informoj en la nederlanda:

Tel. xx-31-43-3062015

Mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de

T. Sinno, In 't Oord 45
NL-6291 VN VAALS

Informationen auf deutsch / Informoj en la germana:

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@t-online.de

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
D-52134 HERZOGENRATH

Jara abono / aligxo : 10 EUR

Belgio : konto 000-0245571-64

Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
B-4800 VERVIERS

Nederlando : provizore bonvolu uzi unu el la du apudaj kontoj (en Belgio aux Germanio).

Germanio : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)

Im Pesch 20
D-52134 HERZOGENRATH

LEGENDO : LA LASTA MARKGRAFO FRANCHIMONTa

Je la fino de la deka jarcento la estro de la markizejo de Franchimont nomigxis Gidono d'Ambleve. Li estis el la plej timindaj nobeloj de l'Ardena arbaro.

Dum nokto de novembro, la markgrafo Gidono, lia edzino Odila, lia filo Regxinardo, la dompastro Poppon – kiu igxos abato de l'monakejo de Stavelot – kaj kelkaj pagxioj kaj servistoj estis sidantaj antaux fajrejo de vasta cxambro de l'feuxda kastelo. Servisto alproksimigxas kaj anoncas al la kastelestro ke pilgrimanto petis permeson tranokti en la biendomo.

Gastigo estis tiam, cxe la nobeloj kaj cxe la servutuloj, devo tiel grava kiel tiu cxeesti diservon kaj komuniigxi en Paska tempo. Baldaux la pilgrimanto estis sidanta apud la fajrejo kaj tranexajxo de cxasajxo kaj krucxo de hordeobiero estis tuj al li alportitaj.

La nekonato estis ankoraux juna. Li havis belan vizagxon, longan hararon nigran kiu atingis liajn sxultrojn, talion sveltan. Cxe lia kolo pendis medaloj kaj amuletoj. Post satigxo, la vojaĝxanto sur la grundon genuigxis kaj lauxte, manoj kunmetitaj, li dankis la Sinjoron pro Lia mirakla helpo kiam li evitis la forfejojn de la Altaj Marcxo, la lupfantomojn, la vaglumojn. Li ankaux dankis Dion ke li estu en la kasteleto de l'Sinjoro Gidono, cxe kiu li havis bonan akcepton, bonan nutrajxon, bonan dormlokon. La paroloj de l'pilgrimulo vekis scivolemon inter la cxeestantoj.

Gidono d'Ambleve tiam petis la junan nekonaton ke li rakontu al ili siajn misaventurojn. Tion li faris. Jen lia rakonto :

"Mi estas la nevo kaj la servisto de Auxberto, la kultinda ermito de Bolland. Mia respektega onklo promesis antaux longe pilgrimi al Lierneux, kie estas la relikvoj de la beataj sanktuloj Andreo kaj Simetro. Pro lia grandagxo, angxelo aperis antaux li, nuligis lian promeson kaj elektis min kiel anstatauxonton.

Mi do forlasis Bolland-on je la fino de la antauxa semajno. Mi longdauxre pregxis antaux la relikvokesto de la du sanktuloj. Mi ricevis medalojn stampitajn laux ilia bildo kaj konsekritajn cxar ili tuxsis iliajn restajxojn.

Mia celo trafita, miaj piaj agoj faritaj, mi revenis hejmen. Post marsxado dum ses horoj, mi alvenis hodiaux, cxe noktigxo, al rando de fagejo, kun mi devis trairi. Mi rigardis, laux ioma teruro, tiujn altajn fagojn senfoliajn, tiujn densejojn, tra kiuj blovis vento malvarma kaj funebreca.

Kapristo kun lia kaprinaro jxus venis al mia direkto. Mi demandis al li pri la irota vojo la plej mallonga kaj la plej senriska. Li montris al mi la gxustan vojon sed li admonis min iri laux la bona vojo kiam mi atingos ian vojkrucigxon. Se ne, se mi vojerarus, ejo sorcxajxa estas sub la pinto de l'monteto nomita Beko.

Esperantigis : Raymond DEMARCHE

Dauxrigo p. 4

La Verbuk ("Verbouc") en Franchimont

La kastelmastro de Franchimont, piulo inter la piuloj, decidis rajdi al Palestino kiel krucsoldato por liberigi la sanktajn lokojn. Por tion fari, li kunigis aron da soldatoj, kies bravegeco faris la famecon de la markizlando.

Tamen kiel sagaca viro, antaux ol efektiviĝi sian longan vojaĝon al Proksim-Oriento, la Sinjoro kasxis trezoron en subterajxon de sia kastelo. Dika kofro sidis en sekreta kasxejo, kiam la kavalerianoj forlasis la fortikajxon.

Sed tia vojaĝo estis ege dangxera kaj postulema cxar antaux ol batali la islam-anojn ili devis elteni la malsaton, la misveteron, la lacigxon, la malsanojn sed ankaŭ bataletojn kun la enlandanoj de la travojaĝitaj landoj. Malfortigitaj, la kuragxaj krucistoj fine atingis la liberigotan landon.

Ili havis nenian ripozon. La Saracenoj incitadis ilin tuj kiam ili eniris en la islaman teritorion. Kiam okazis la unua batalo kontraux la remparoj de Jeruzalemo, malamika sago mortige vundis la sinjoron de Franchimont. La okuloj duone fermataj, la parolo malfacila, li opiniis ke la kavaliro genuigxanta apud li por ekstrema konsola kuragxigo estis lia plej bona amiko Johano de Sassor.

Kaj li konfidis sian sekreton : « *Johano, mia amiko Johano... en mia kastelo... cxe la fundo de l'subterajxo... la kofro... la orajxoj... Ke Dio...* ».

Kaj li donis sian animon al tiu dio kiu auxdis liajn lastajn pensojn. Misauxgura ridajxo sekvis tiun lastan alpregxon. Cxar la markizo de Franchimont ne konfidis sian sekreton al Johano de Sassor sed al la Malbonulo mem, kiu vizitadis tiajn turmentatajn lokojn sercxo al malpiaj animoj.

Jaroj pasis.

La kastelo Franchimont sidas sur roka ekstremajxo de kresto superstaranta la valon de la rivero Hoëgne. Kvankam ankoraŭ logxata tiuepoke, oni rakontis ke gxia subgrundo estis fantomata. En sekigata puto tunelo kondukis al la enigma trezoro de l'Sinjoro de Franchimont. Se troriskemulo -aux prefere nekonscianto- estis intencanta eniri en la tunelon, li estus auxdanta galopbruon sur la skisto de l'grundo. Unu « Verbouc » ja dejxoras dauxre laux la ordono de Satano por zorge prigardi la altvaloran kofron. Sed kia estas la aspekto de tiu demona estajxo ? Laux la onidiro - sed cxu estas la vero ? - gxi havas kapon de virkapro kaj tute nigran felon.

Ege atentema gxi lasas neniun alproksimigxi al la trezoro **escepte** dum la Kristnaska nokto, dum unu horo, cxirkaux la noktomezo.

Tiam la besta servisto de l'demono sin kasxas en profundan kavon por ne auxdi la sonon de la sonorilo kaj la kantojn en la pregxejeto de l'kastelo. La elvoko de la naskigxo de Jesuo-Kristo ja estas al gxi netolerebla.

Tamen en sia provizora rifugxejo, la « Verbouc » restas nepre gvatauxskultanta. Se tiumomente iu uzas la okazon sxteli la kofron, tiaokaze li devus devige silenti dum la agado. Se li apenaux parolas, ve al li kiam la « Verbouc » ekaperos.

« *Cxu tia mizero ne estas hontindajxo ?* » ekkrias Koleno, kampulacxo de Franchimont. « *Mia edzino estas malsana kaj miaj geknaboj malsatas. Kiam mi scias ke proksime de cxitie ormoneroj helpus nin vivi gxis nia morto, mi grumblas. Kia felicxo se tiu malbeninda « Verbouc » reirus en la inferon !* ».

Esperantigis R. **Demarche**

Sekvo p. 3-a

La Verbuk ("Verbouc") en Franchimont (2)

« Vi tute pravas ! repondas Gxilo, lia kunulo. Mi timas ke la ekanta vintro estu inter la plej malmildaj. Ecx la malgrandaj cxarbestoj estas malabundaj kaj miaj masxkaptiloj restas malavantagxe sen rabajxo. Kristnasko alproksimigxas kaj mi ne scias kiamaniere mi nutros mian familion ».

- « Sen tiu « Verbouc », mi diras al vi, sen tiu « Verbouc » !!!

- « Kaj cxu ni provus la aventuron ?... »

- « Cxu vi frenezus, Gxilo ? Cxu vi forgesis kio okazis al la misxanca Mateo, el Spixhe ? Li preskaux mortis kvankam li perdis brakon... sed cxefe la spiriton ».

La sugesto de Gxilo tamen turmentis Kolenon. Dum longa diskuto vigla, la du amikoj decidis kune proprigi al si la kofron. Dum tagoj ili observas la korton kaj la kastelan puton. Ili taksas la nepre necesan ilaron uzotan, gxian pezon, gxian grandecon, gxian efikon. Kaj la du viroj estas finpretaj antaux Kristnasko. Postenigxantaj proksimece de la puto, ili febre atendas la unuan frapon de la kapela sonorilo anoncanta la Kristnaskan diservon. BIM ! La frapado de la virkapraj hufoj sur la skista grundo malkreskas pli kaj pli.

Silento. La « Verbouc » estas en sia provizora rifugxejo. Al la atako !

Tuj Koleno kaj Gxilo kuras gxis la sxtona balustrado de la puto. Ili flamigas sian kandelon el sebo, ligas sxnurojn cxe la putorando, malsuprengrimpas en la malhelan profundon, malkovras la subterajxon kaj tien enfauxkigxas.

Kelkfoje glitantaj sur la kota grundo, ili antauxeniras gxis kaverneto en kiu sidas la mita kofro de la markizo de Franchimont. Sen malfermi la fermoplaton por admiri la orajxojn – cxar urgxas – la du kunuloj firme ligas la kofron kaj eltiras gxin en la koridoron.

Penige kaj sxvitante ili sukcesas atingi la ekstremon de la tunelo gxis la cirkla fundajxo de l'puto. Tie ili zorge ligas la kofron al la sxnuroj antauxe ligitaj al la putorando kaj pendantaj en la puto. Post la grimpado de la du homoj gxis la supro, estas la malrapida hisado de la peza ujo. Kun sxanco ili sukcesas ke la kofro ne bruu kontraux la flankoj de la sxakto.

La hisado estas preskaux finata kiam la kofro aperas el la sxakto. Lasta peno, lasta tiro kaj la ujo frotas sur la randon de la mureto... premanta manon de Gxilo.

- « *Pro Dio !* » ekkriis la mallertulo.

La blasfemo malkvietigis la noktan silenton. Grumblado de kolerego sekvata de galopo de hufoj ilin alarmas ke la diabla gardisto alkuras rapidege al ilia direkto. Ve, ili malsukcesis je la lasta momento ! Nun ili scias ke ili devas forkuri por savi sian vivon. Ili malstrecxas la sxnuron, la kofro malaperas en la fauxkon kaj frakasigxas sur la fundajxon. Sed la du misxanculoj estas jam kurantaj freneze el la kastelo por reiri al la valo.

Brancxoj, lianoj de la klematidoj, rubusarbetoj, sxtonoj ne gxenas ilin dum ilia konfuza fugxo antaux la varma blovo de l'furioza « Verbouc ».

Cxu la mirakla kristnasko savis ilin ?

Ili atingas la valon elcxerpitaj, surface vunditaj, veste dissxiritaj sed cxefe vivantaj, kiam la fideluloj rehejmigxas post la noktomeza diservo.

La trezoro de l'iama sinjoro de Franchimont cxiam kusxas en la sino de la feuxda kastelo. Dum la noktokunsidoj Gxilo kaj Koleno ofte rakontis al cxiu kiom ili panikigxis dum tiu sankta nokto, dum kiu ili riskis koni la angorojn de la infero.

LA LASTA MARKGRAFO FRANCHIMONT^a (dauxrigo)

Damaoj, cervoj, ecx aproj timas alproksimigxi al tiu loko ensorxita sed serpentoj, bufoj, korvoj kaj noktuoj sxajnas gxin sxati. « Vi sekvu do bone miajn admonojn, diris la kapristo, kaj sankta Remaklo protektu vin cxar morgaux estos vendredo ». Mi iris en la arbaron, post pluraj krucoisignoj”.

La pilgrimulo silentis, aspektis malkviete kaj iomete tremis. Post la lastaj paroloj diritaj de la rakontanto, pastro Poppon faris signon de l'kruco. La gasto de l'kastelestro dauxrigris sian rakonton.

”Pro la mallumo de la nokto mi ne atingis la dangxeran vojkrucigxon. Mi marsxis longatempe sur la sama vojo sed mi ne sciis kien mi iris.

Subite mi auxdis kun gxajo malproksimajn bojadajn. Tiuj bojoj iom post iom pliproksimigxis. Baldaux la hundo bojis apud mi. gxi silentis kaj amike gxi eklekis miajn manojn kaj karesis min. gxi havis grandan amplekson kaj gxia felo sxajnis al mi tute nigra. gxi iris antaux mi kaj mi sekvis gxin, kontenta trovi gvidanton kaj se necese defendonton. Mi ekvidis lumon tra la arboj sed mia gxajo igxis teruro kiam mi konstatis ke mi estis sur la monteto Beko, rifugxejo de la lupfantomoj. Mi ne plu havis forton nek antauxeniri nek retroiri. La hundo estis forigxinta. Mi estis kiel statuo.

Mi auxdis hurladon kaj la grundo tremis sub miaj piedoj. Tiam mi vidis, mi vidis...”.

Lia emocio estis transdonita al cxuij geauxskultantoj – krom al Gidono, kiu estis rikananta.

”Mi vidis Gorr, li diris, la estro de la lupfantomoj, la mangxanto de homoj. Gxi estis staranta supre de la teramaso. Mi tremetis gxis la medolo de miaj ostoj pro gxia staturigo giganta, gxia harkovrita korpo, gxia kapo hida, gxiaj okuloj kruelaj, gxiaj fortikaj makzeloj, ...

Sed kiam mi rigardis malantaux mi, lupfantomoj cxirkauxis min. Jes, Viaj nobelaj Mosxtoj, lupfantomoj, kies staturigo estis duobla de tiu de ordinaraj lupoj. Ili staris senmovaj, min rigardantaj, aspektantaj atendi signalon.

Subite, hurlante, ili kuris, dancis cxirkaux mi, sed mi rimarkis ke iom post iom ilia rondo mallargigxis. Mia morto estis nepra. Ilia estro, ankoraux senmova, frapis la grundon per sia piedo. Senprokraste la teramaso malfermigxis kaj mi estis altirita al la fendego.

Tuj mi rapide saltegis malantauxen, prenis en miaj manoj la medalojn pendantajn kontraux mia brusto kaj mi ekkriis : « En la nomo de Dio kaj de la sanktaj Andreo kaj Simetro, Liaj plej amataj piuloj, forigxu inferaj spiritoj ! ».

Teruraj hurladoj ekbruegis cxirkaux mi. La lupfantomestro sxanceligxis. Forta vento jxetis al mia vizagxo milojn da folioj sekaj. Senbruo revenis. Sed mi ne vidis kiamaniere la lupfantomoj kaj ilia estro malaperis.

Mi genuigxis kaj fervore kisis miajn karajn medalojn, kiuj savis mian vivon. Poste mi iris laux unu el la kvar vojetoj de tiu vojkrucigxo infera. Mi baldaux eliris la arbaron kaj post mallonga vojlongo tra erikejoj, mi vidis kun gxajo la altajn turojn de l'kastelo Franchimont.

Felicxa mi estas, Damaoj kaj Sinjoroj, se mi sukcesis mallongigi vian maldormadon dank'al mia rakonto kaj plie montri al vi pruvan ekzemplon de la malicioj de l'Malbonulo kaj de la cxiopovo de Dio kaj de Liaj Sanktuloj. “

Plurfoje dum la rakonto, Gidono d'Ambleve montris signojn de skeptikeco. Li do respondis al la nevo de Auxberto : “Cxu vi ne songxis tion kion vi rakontis al ni ? Centfoje mi rajdis en la fagejo. Mi do konas cxium lokon de tiu arbaro. Dum cxasoj mi ofte rajdis tage kaj vespere apud la fama teramaso en kiu logxus laux vi tiel multe da malbonaj uloj, sed nur vulpo-terneston mi vidis. “

“Via Sinjora Mosxto, mi jam diris al vi ke Diabla estas ruza. Tiuj kunvenoj malbenindaj okazus vendredon. Eble vi transiris tiuj vojkrucigxon alian tagon de la semajno “.

La markgrafo rapide starigxis. “En nia epoko la nuraj ajxoj timindaj estas spado aux hakilo, tenita de mano firma kaj lertigxinta. La okazo estas favora por iri tuj al la vojkrucigxo Beko por tie provoki Gorr-on kaj gxiajn lupfantomojn. Mi fine scios cxu cxitere demonoj ekzistas. Mi provos ilian potencon kontraux mia kuragxo kaj miaj armiloj”.

Lia edzino Odila kaj lia dompastro Poppon ne sukcesis sxangxi lian opinion. Regxinardo, lia 18-jara ido, decidis akompani sian patron.

La du homoj do sin vestis en militira uniformo. Kiam Odila proponis al sia edzo medalionon enhavantan relikvon de sankta Elojo, li rifuzis. Sxi ligis tiam la medalionon al la kolo de sia filo kaj sxi kisis gxin pie. Poste la markizino longe kisis sian edzon kaj sian filon, kaj la gelogxantoj de l'kastelo sekvis la du kavalirojn gxis la levoponto.

Kiam ili revenis en la komunan cxambron, ili surprize konstatis ke la pilgrimulo estis for.

Ekstere la nokto estis malhela kaj malvarma. La du militistoj perfekte sciis la vojon por iri gxis la fagejo. Ili sciis ankaux la irotan vojetojn por atingi la monteton Beko. Sed post kelkaj centoj da pasxoj, malgraux sia lanterno, ili ne plu marsxis sur la gxusta vojo sed tra rubusujoj. Ili provis iri aux dekstren aux maldekstren, aux malantauxeniri. Vane. Ili konstatis ke ili vojeraris sen trovi klarigon. Nun pluvegis. Sub iliaj piedoj, cxio estis nur obstakloj kaj dangxeroj.

Finfine post kvarhora marsxado elcxerpinta, ili vidis la timandan vojkrucigxon sed cxefe la pilgrimulon kiu kauxzis ilian cxeeston en tiu loko. Ili marsxis al li sed la alia homo – sed cxu estis homo ? - retroiris rigardante ilin per okuloj kiuj aspektis flambri. Subite uloj nevideblaj renversis ilin. Ili auxdis cxuiflanke hurlantajn lupojn sed ili nur vidis iliajn sangosoifajn pupilojn.

Falinte, Regxinardo prenis gxis siaj lipoj la medalionon donitan de sia patrino kaj kisis gxin fervore. Li ankoraux auxdis sian patron kianta sian baptonomon. Poste estis vekrio, al kiu postvenis triumfaj krioj, eligitaj de gorgxoj, de vocxoj tute ne homaj.

Neniu enlitigxis en la kastelo Franchimont. Poppon lauxte prexis kaj cxiu same faris.

Je la ektagigxo, kastelano rekte iris gxis krucajxo Beko. Ili trovis Regxinardon vivanta sed nekonscia sur la grundo. Pri la markgrafo Gidono ili sciis ke li estis dissxirita, kiam ili trovis lian spadon brexetitan kaj fortorditan sed cxefe kiam ili vidis sxirpecojn da karno kaj da vesto.

Dum krucmilito Regxinardo d'Ambleve rajdis al Palestino, kie li mortis. Lia markizejo tiam apartenis al Balderiko, princepiskopo de Liegxo. Sur la monteto Beko, post serioza ekzorcadado, oni konstruis pregejeton en kiu la medaliono de la lasta markizo de Franchimont estis deponita kaj kultita kiel provajxo nerefutebla de la povo de l'relikvoj.

Kiam Marceleno La Garde skribis tiun legendon, li diris ke en 1879 la medaliono estis ankoraux videbla en la pregejo Sankta Elojo de la vilagxo Beko. Cxu tiu relikvo ankoraux ekzistas 85 jarojn poste ? Eble estos celo de baldauxa promenado por iuj inter ni.

Trad.: Raymond DEMARCHE

WDR 3 (Akeno) elsendis pri Neuxtrala Moresneto kaj esperanto



S-ino Rieck, loka kunlaborantino de WDR-televideo (Akeno), hazarde eksciis dum ret-krozado pri la ekzisto de esperanto-grupo en Akeno kaj pri la historio de Neuxtrala Moresneto.

Sxi interkonsentis kun estroj de WDR pri TV-elsendo tiurilata, kiu estas filmita la 31-an de julio en Kelmis kaj elsendita iom antaux la 20-a horo, la 13-an de aŭgusto, kadre de sekvenco « LOK-regio Aachen » tuj post la cxiutagaj informoj.

La televida prezentisto enkondukis la temon unue atentigante la spektantojn pri la facileco kaj reguleco de esperanto kaj kiel rapide oni tial povas gxin lerni kaj praktiki.



Surloke la televida teamo unue renkontigxis, je la 13-a horo, kun « la » tiea historiisto pri Neuxtrala Moresneto, memkompreneble nia

samideano Mathieu **Schrymecker**, kiu rakontis pri la kreota stato esperantista kaj la tiama esperantista vivo en Kelmis (kursoj, teatro, dancado,...).

Videblis diversaj nuntempaj lokoj kaj tiutempaj posxtkartoj. Sekvis poste prezento de la hodiauxa esperantista vivo en Kelmis, kun filmero montranta kunvenon en nia kultur-centro Kelmis (kie ni sxajnis kunveni cxirkaux la 14-a horo).

La prezentisto anoncis ke dauxre okazas regulaj kunvenoj en Select. Partoprenis dudeko da regionaj samideanoj vokitaj cxu persone, cxu rete. Dum tiu (fiktiva) kunveno sub la esperantista flago kaj meze de diversaj esperanto-libroj, Klaus Hogen skizis la strukturon de nia lingvo.

La televida teamo poste filmis la iaman minejon kaj retrovis la **Senliman** esperantistaron en la protestanta tombejo, kie poreterne ripozas D-ro Molly, unu el la cxefaj iniciintoj de esperanto en Moresneto, kies rolo reliefigxis komence de la elsendo.

La filmado finigxis cxirkaux la 17-a horo post vizito al la loka muzeo kie svarmas dokumentoj pri tiu grava esperantista periodo. Fine de la kvinminuta elsendo, la prezentisto konkludis ke grupo da esperantistoj plu flegas sian lingvo.

Iom pli ol unu jaro post la franclingva elsendo de RTBF ("Forts en tête"), ni esperas ke tiun aparte honestan elsendon atente vidis multaj regionaj germanlingvanoj.

Tio cxiaokaze pruvas ke nia agado (reta cxeesto kaj loka aktivado) tute ne estas vana. Nun, espereble baldaux elsendo nederlandlingva !Partoprenu niajn kunvenojn kaj trilandajn renkontigxojn kaj vizitadu nian ttt-ejon (<http://www.ping.be/jmjsenlime>).

Enestas interalie informoj pri nia venonta trilanda renkontigxo en Franchimont (B-Theux, apud Verviers). Limigita nombro da cxeestontoj : frua aligxo necesas!



El Kelmis, pieda promenado tra bela arbaro ebligas, irante al la trilandlima punkto, malkovri la iamajn lim-sxtonojn inter Neuxtrala Moresneto kaj la najbaraj landoj...

Verviersa **A**nguloVerviersa **E**speranto **G**rupa

Trilanda Renkontigxo en Theux-Franchimont

Komitato de V.E.G.:

Prezidanto: J. Jacob
Petit Jonckeu 18
4803 POLLEUR
Tél. 087/22.10.79

Kasisto: R. Demarche
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Sekretario: J.-M. Jacques
Place Verte 23 bte 3
4800 VERVIERS
Tél. 0486/947.957

V.E.G. dependas de la franclingva
Asocio por Esperanto (A.P.E.)
M. Delforge
Rue des Glacères 16
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations (inchangées !) suivantes au compte n° 000-0245571-64 de:
Esperanto grupo
Rue Donckier 22
4800 VERVIERS

D'avance, merci à tous !

APE 2000-2001 10 EUR
UEA 2002 50 EUR
Senlime 2002 10 EUR

Nouveau cours d'espéranto à

Verviers : première leçon le 15 octobre (durée : 6 semaines + 25 semaines de lecture à domicile avec assistance téléphonique).

Renseignements et inscriptions :
J.-M. Jacques

La 2-an de oktobro 2002 okazos/is nia trilanda renkontigxo en Theux, apud Verviers, en komplete mezepoka etoso.

La historia centro de Theux enhavas kelkajn belegajn konstruaĵojn de la Moza Renesanco : je la n-roj 2-4-12 de la placo de la « Perono » [libereca kolono] kaj la n-ro 29 de la strato de la Sxoseo ; stilo Ludoviko la 14a : n-ro 10 de la placo de la Perono, n-ro 15 de la strato de la Sxoseo ; stilo Ludoviko la 15a n-roj 22 kaj 42 de la placo de la Perono kaj multaj aliaj konstruaĵoj el la 18a kaj 19a jarcento.

La libereca kolono [Perron]

Konsistas, piede, el kvar okangulaj sxtupoj kun strangaj logxietoj baze de la kolono surstarigita de pinkonuso, simbolo pri la liberecoj akiritaj en 1457 en Liegxo. La nuntempa kolono estas starigita en 1768.

Sekve de la katastrofo (gas-eksplodo de la 4a de januaro 1997), la centro estas deklarita « Malnova protektata centro ».

La urbodomo

Estis konstruita en 1770 (stilo Ludoviko la 16a) de B. Digneffe. Gxi enhavas pentraĵojn el la fino de la 18a jarcento montrantaj la Justecon kaj la Prosperon.

Gxi estas matene malfermita de la lundo gxis la sabato.

La pregxejo de la Sanktuloj Hermeso kaj Aleksandro

Gxi estas halpregxejo el la 11a jarcento (tri navoj kaj plata plafono). Dum la 12a jarcento, fortika turo estas konstruita norde prefere ol okcidente.

Dum la 14a jarcento, la pregxejo estis fortikigita per angulaj turetoj (hodiaux malaperintaj) kaj la turo surstarigita de lignaj galerioj. Cxirkaux 1500 gotika hxorejo anstatauxas la rektangulan romanikan hxorejon. La plafonoj estas ornamataj de 127 pentraĵoj sur ligno el la 17a jarcento. Kelkaj lignaj statuoj el la 15a kaj 18a jarcento estis restaŭritaj. La baptujo estas pelvo el la 12a jarcento.

La pregxejo tutjare viziteblas de la 10a gxis la 17a horo ; informoj en la parokestrejo ; tel. XX-32-(0)87/54.13.31.

La kastelo Fransximonta

Estas konstruita cxirkaux la 11a jarcento. Starigita cirkaux rektangula korto, la unua kastelo, nun ankoraux bone videbla, konsistis el tri aloj da konstruaĵoj, traboritaj de porarkistaj truoj, kaj oriente de masiva cxefturo. Dum la 12a kaj 14a jarcentoj, tiu cxefturo estas flankita de angulaj konstruaĵoj kaj en 1387, la tuta orienta flanko, la plej atakebla, estas defendita de sxildego komponita per du plenaj turetoj kaj sprono. Dum la regno de Erard de la Marck (1505-1538), la fortikajxo estas adaptita al la pafartilerio : alta kvinangulo zono sxirmas la primitivan kernon. Cirklaĵaj kazematoj provizitaj per kanontruoj flankas kvar angulojn de la cxirkauxremparo, dum norde dika artileria turo kazematita defendas la enirejon.

Gxi viziteblas de Pasko gxis oktobro, de la 10a gxis la 18a horo ; tel. XX-32-(0)87/74.10.27.

Kelkajn bildojn pri la Fransximonta lando vi povas spekti en nia fotoalbumo cxe

<http://fr.photos.yahoo.com/jmjsenlime> (dosiero "Theux").



Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno

En cas de non-distribution, renvoyer à
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzenh@gmx.net

Jarkolekto : 2002

Suplemento al numero : 4 Paĝo : 7

La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

Editeur responsable
Responsa eldonanto +
Informoj en la franca lingvo:
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jmjsenlime@planetinternet.be
J.-M. Jacques, Pl. Verte 23 bte 3,
BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands
Informoj en la nederlanda:
Tel. xx-31-43-3062015
Mail: sinno@ibac.rwth-aachen.de
T. Sinno, In 't Oord 45
NL-6291 VN VAALS

Informationen auf deutsch
Informoj en la germana:
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@t-online.de
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

Tiu-ĉi informilo aperas kvarfoje en jaro.

Jara abono / aliĝo : 10 EUR

Belgio : konto 000-0245571-64
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
B-4800 VERVIERS

Nederlando :
ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi
provizore bonvolu uzi alian konton.

Germanio : konto 6623201,
Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)
Im Pesch 20
D-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la
novjara periodo (decembro aŭ januaro).
La kotizintaj membroj principe ĝuas
rabaton okaze de aliĝo al Trilanda
Renkontiĝo organizita de *Senlime*.

Senlime

invitas vin al

ZAMENHOF FESTO

EN KULTURA CENTRO "SELECT"

(B) Kelmis

dimanĉon, la 15-an de decembro 2002

Programo

11h15 : malfermo de la akceptejoj

12h30 : tagmanĝo (prezo : 20 EUR)

- **Ceposupo**
- **Rostpano kun fungoj**
- **Porka lumbaĵo (kun cigan- aŭ bearn-saŭco) aŭ Fiŝaĵo (lupfiŝo) kun hakitaj legomoj**
- **Glacia sufleo framba.**

15h00 : diversaĵoj, kulturaj programeroj,...

17h00 : fermo kaj ĝis revido.

Deviga antaŭ-aliĝo (limdato : la 6-an de decembro) ĉe

Raymond Demarche
22 rue Donckier

BE-4800 VERVIERS

xx-32-(0)87-22.68.18

La 15-an de decembro 1859 naskiĝis Zamenhof.

En 1927, Julio Baghy proponis ke tiu datreveno estu la **tago de literaturo kaj libro en esperanto**, propono aprobita dum la Universala Kongreso en Danzig.

Aliĝilo: Zamenhof-festo

Ĉiu partoprenonto nepre kompletigu apartan aliĝilon (aŭ fotokopion) kaj resendu ĝin antaŭ la 6-a de decembro al
S-ro R. DEMARCHE, 22 r. Donckier, BE-4800 VERVIERS.

Forstreu la nevalidajn menciojn kaj krucumu la elektitajn alternativojn (aŭ preferojn).

La mendinto/subskribinto persone responsas pri la surloka pago, nur per EUR-oj, de sia mendo (ne uzu ĉekojn, ĝirilojn, k.t.p.!).

Senlime nepre fakturos la menditan tagmanĝon kaze de ne-partopreno.

S-ro/S-ino/F-ino:

Naskiĝdato:

[[]] [[]] [[]]

jaro monato tago

[[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]]

familia nomo (por alfabeto ordigo)

[[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]]

antaŭnomo aŭ persona nomo

Adreso:

[[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]]

strato kaj numero

[[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]]

landa + urba kodoj urbo

[[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]]

tel. n-ro (kun zona prefikso) faks. n-ro (kun zona prefikso).

[[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]] [[]]

ret-adreso

- legis, komprenis kaj aprobas la invit-kondiĉojn,
- aliĝas al la Zamenhof-festo de Senlime en Kelmis (Select) la 15-an de decembro 2002

- elektas porkan lumbaĵon
lupfiŝaĵon

- surloke pagos la sumon da 20 EUR (tagmanĝo sen trinkaĵoj)

N-B : NE ekzistas rabatebleco koncerne la Zamenhofan feston.

Dato:

[[]] [[]] [[]]

jaro monato tago

Subskribo:



Vendredon, la 15-an de novembro 2002 - 19h30 - Kelmis (B) - Komuna kunveno de la grupoj de **Senlime** en Select : « **La korpo per 14 demandoj** » metitaj de Raymond DEMARCHE (kunprenu vian vortaron !), diversaĵoj.

Inf. Raymond DEMARCHE, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS
Tel. +32/(0)87/22.68.18

Dimanĉon, la 15-an de decembro 2002 - 11h15 - Kelmis (B) - Zamenhof-festo en Select.

Inf. Raymond DEMARCHE, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS
Tel. +32/(0)87/22.68.18

Trilanda renkontiĝo printempa 2003 verŝajne okazos kune kun "revelo-tago" en Kelmis (B) : dato kaj programo decidotaj.

Trilanda renkontiĝo aŭtuna 2003 okazos en Lieĝo (B) : la temo estos "Simenon" (vizito de ekspozicio kaj spuroj de la aŭtoro en lia naskiĝurbo) - dato decidota.

*

Pro eblaj program-ŝanĝoj, prefere kontaktu la menciitan personon antaŭ ol partopreni aktivajn.